En Flandra Esperantisto de julio 1937 aperis sciigon: Post Lebbeke sekvis la fondiĝo de novaj sekcioj en Brugge.... Tiu fondiĝo okazis post Esperanto-kurso de la VTB (Vlaamse Toeristenbond) en Bruĝo de januaro 1937 ĝis la 12-an de marto en la tiama junulgastejo, placo Sint Jan (nuna ĉokoladmuzeo). La gelernantoj fariĝis amikoj kaj tial fondis grupon kiu poste aliĝis al la tiama Flandra Ligo Esperantista (FL.L.E.), kun jam 26 sekcioj. Alia Esperantogrupo en la urbo, la Reĝa Bruĝa Grupo Esperantista, ekzistis jam de la komenco de la 20-a jarcento, sed aliĝis al Reĝa Belga Ligo Esperantista.

La unua prezidanto de la nova grupo estis Etienne D'Haenens el Oostende, sed post du semajnoj li jam demisiis por esti anstataŭigita de Fernand Roose. Same por la ekinta sekretario E. Van Heulebroeck, anstataŭigita per Roger Iserentant. Tiu teamo gvidos la junan grupon tra la dua mondmilito, kaj festos la 50-jaran jubileon.

La grupa nomo ek de la ekesto ne nur estis titolo, ĝi prezentis programon: Paco kaj Justeco.

Post nova kurso komence de 1939, kun 40 gepartoprenantoj, la juna grupo sentis sin sufiĉe forta kaj entuziasta por organizi la 9-an Kongreson de FL.L.E. kun pli ol 300 aliĝintoj. Tiam okazis la granda katastrofo por kiu ajn internacia agado, la dua mondmilito en septembro 1939 kaj poste la okupado en majo 1940. La okupanto komence toleris la Esperanto-agadon, permesis la organizadon de kursoj fine de 1940, sub gvidado de nia prezidanto mem. Inter la dekdu kursistoj troviĝis iu juna studento, Grégoire Maertens. Sed la dekreto de majo1941 malpermesis la agadon de ĉiuj asocioj kun internaciaj celoj. La grupo de Bruĝo sin inklinis ŝajne, sed la grupaj kunvenoj eĉ pli oftiĝis per ĉiudimanĉa kunesto por ŝakludi, por ludi tablotenison kaj retpilkon.Tiu juna grupo faris eĉ unikan kaj tre danĝeran paŝon, eldonante stencilitan grupan bultenon, grandparte mane transdonitan, sed ankaŭ perpoŝte forsenditan en fermitaj kovertoj. Tiu revueto, kun varia enhavo, aperis monate ĝis novembro 1947. Komence ĝi estis presita en la klaso de Frato Efrem en la lernejo de la fratoj Ksaverianoj (Sint Franciscus Xaverius – Instituut) en Bruĝo, pro la fakto ke la plimulto de la gemembroj de Paco kaj Justeco estis ankoraŭ lernante tie. Postmilite, la revuo aperis en la "Ora Libro de la Rezistado" (Gulden Boek van de Weerstand)" sub la nomo de Paco kaj "Justico". Montriĝis ke tiu eldono estis Esperanto-unikaĵo en la okupitaj partoj de Eŭropo. La Biblioteko Hodler en Rotterdam disponas pri la kompletaj jarkolektoj.

Tuj post la milito, Paco kaj Justeco estis preta por la organizado de la unua postmilita kongreso de FL.L.E. en Bruĝo, en 1946, kun kelkaj centoj da gepartoprenantoj. Tie la grupo mem prizorgis la varian vesperon. En la raporto pri la kongreso (Flandra Esperantisto, junio 1946) tiu varia vespero estis menciita kiel la ĉefaĵo de la tuta programo. Dum la postaj 11 jaroj, la sama grupo prizorgis ĉu teatran, ĉu varian vesperon dum la Konferenco de Tutmonda Junularorganizo (La nuna TEJO) en aŭgusto 1946 en Blankenberge, dum la kongresoj de FL.L.E. en Mechelen 1947, Blankenberge 1948, Gent 1949, Oostende 1950, Hilversum 1951 (Kongreso kunlabore kun la nederlanda Esperanto-asocio). Sekvas la Beneluksaj kongresoj (L.E.E.N. tiu estis la Nederlande Esperanto-asocio, kaj Reĝa Belga Ligo Esperantista, kaj Flandra Ligo Esperantista), en Roterdamo 1952, Antverpeno 1953, Lieĝo 1954, Utrecht 1955, kaj denove en Gent 1956.

Sed tiaj, ofte altnivelaj prezentadoj ene de kongreso ne kontentigis la grupan estraron. La ĉefa celo de esperantogrupo ja devas konsistis en varbado, i.a. por ĉiujara kurso. Ni faris tion per diversspecaj metodoj (gazetaraj artikoletoj, anoncoj kun invito por iuj grupvesperoj – ekzemple la japanaj dancoj prezentitaj de la ĵurnalistino Joŝika Kaĵino -), sed ĉefe pere de la invito de konataj kantist(in)oj, ĉiuspecaj muzikantoj kaj orkestretoj kaj la tiutempe bone konata hipnotigisto Verda Stelo, membro de nia grupo:

1950 en la Volksschouwburg, la hipnotigisto La Verda Stelo, en 1952 "Accordeola" de radio Hilversum, en 1953 "The Ramblers", kun Theo Uden Marsman en la urba teatro; ankoraŭ en 1953, en la sama teatro, La Granda Antverpena Revuo-Kompanio, kun Max van Praag kaj Louis Baret, k.t.p. Tiel ekzemple, la urba teatro, tute homplena (800 personoj), eksciis ĵus antaŭ paŭzo, pere de

"hazarda" renkontiĝo de du aŭ tri personoj sur la scenejo, ke Esperanto-kurso okazus baldaŭ, sub gvidado de elokventa historiisto Fernand Roose, kun kelkaj klarigoj pri loko kaj tago kaj horo, pri longeco kaj pri la postaj eblecoj de internaciaj kontaktoj kaj korespondado.

Ni partoprenis en multaj sekvantaroj kun nia verda flago kaj la verdjupulinoj: la grupaninoj portis tiam verdan jupon kaj blankan bluzon kun la verda stelo: ĉiuj Bruĝanoj eksciis pri ili.

En 1962 ni festis nian 25-jaran ekzistadon , i.a. per solena akcepto en la Gotika Salono de la Bruĝa urbodomo; prof. G. Waringhien el Parizo festprelegis.

Sciante pri tiom da aktivecoj, la Turista servo de la urbo ne hezitis eldoni turistan faldfolion pri la urbo en Esperanto. Ni liveris la tradukadon de la proponitaj tekstoj. La Turista servo miregis kiam ili konstatis ke la eldonkvanto post relative mallonga tempo jam malaperis pro petoj el eksterlando.

La oftaj kunvenoj kaj la organizado de multaj eventoj en grupa kadro ne povis resti sen sekvoj en nia socia vivo: ni ĉiuj estis vivgeamikoj, 11 geedzaj paroj ekestis kaj la gefiloj fondis komence de la deksesaj jaroj la Junulargrupon. Tiu grupo eldonis revuon, partoprenis en ekspozicioj, inaŭguris la Zamenhofstraton en Sint-Kruis Brugge, havis propran ejon (sur tereno meze de arbareto de la geedzoj Roose-Dekersgieter) kaj mem organizis kursojn pro varbado ene de la skoltoj kaj en la diversaj lernejoj. Kelkaj vizitis la Universalan Kongreson en Budapest (1966) kaj Madrid (1968) partoprenante en la Karavanoj Suden. Paco kaj Justeco organizis kvin tiajn karavanojn al UK-ojn. Krom la du menciitaj, same al Sofia (1963), Beograd (1973) kaj Athene (1976). Menciinde ke partoprenanto al Madrid lernis la lingvon dum la vojaĝo de tri semajnoj, multon komprenis kaj parolis iomete.

Dek jaroj post la starigo de la junulargrupo, la disigado pro la universitataj ŝtudoj, la laboro, kaj sociaj devoj neniigis tiun tre aktivan parton de Paco kaj Justeco.
Dank' al la kunlaborado inter tri asocioj pro la Beneluksaj kongresoj, kelkaj membroj de la grupo (F. Roose, Gr. Maertens kaj R. Iserentant) povis kunlabori al la reorganizado de la Belga Esperanto-movado. Anstataŭ Reĝa Belga Ligo Esperantista por la tuta lando kaj Flandra Ligo Esperantista por Flandrio, oni ellaboris statuton de Belga Esperanto-Federacio (BEF) por la tuta lando. La statuto de tiu BEF aperis la 18-an de januaro 1962 en la Belga ŝtatgazeto

Paco kaj Justeco kaj la junulargrupo, kunlabore kun la Reĝa Bruĝa Grupo Esperantista organizis en aprilo 1975 la 57-an kongreson de Belga Esperanto-Federacio, samtempe Eŭropa konferenco pri la Esperanto-skoltado. Tiu konferenco okazis sub la aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.) kaj en kunlaboro kun la skoltgrupo Don Bosco el Bruĝo. La ĝenerala sekretario de la Skolta Esperanto-ligo, Ko Hammer el Zaandam, Nederlando, gvidis la debatojn kaj ankaŭ la delegacion kiu estis akceptita de la urba estraro en la urbodomo.

Iom poste la grupo kunlaboris kun la kulturasocio" Moritoen"(fama Bruĝa poeto, fine de la 15a jarcento) por la dimanĉmatenaj kontaktoj " Lingvoaperitivo". En tiu kadro ni prezentis la skeĉon "La Babela turo" en 1976.

Kaŭze de la splitiĝo de la Belga Ministerio por Kulturo en nederlandlingva kaj franclingva ministerio, la du ministroj postulis la ekziston de apartaj asocioj por la subvenciado de kulturaj asocioj. Pro tiu postulo, kaj post debatado en la sino de





BEF, oni kunmetis novan statuton por BEF, per kiu kunlaboras diversaj apartaj asocioj, kiel la Asocio por Esperanto (APE), la Brusela Grupo Esperantista, Flandra Esperanto-ligo (FEL) kaj la Belga Esperanto Fervojista Asocio (BEFA). Al ties efektivigo kunlaboris denove F.Roose (Prezidanto de la nova BEF), R. Iserentant, kaj Gr.Maertens. La nova statuto troviĝas en la Belga ŝtatgazeto de la 21-a februaro 1980.

En 1981, de la 11-a ĝis la 2o-a de februaro, ni ekspoziciis en la kadro de granda hobio-prezentado en la borshalo per granda stando dum unu semajno. La tago de la internacia amikeco ni festis la 25an de februaro 1982 per oficiala kunsido, denove en la gotika salono de la urbodomo. La prezidanto substrekis la gravegan rolon de Esperanto por internaciaj amikaj rilatoj kaj la festparoladon elokvente prizorgis la honora rektoro de la Eŭropa Kolegio en Bruĝo, H. Brugmans.

Kiel jam menciite en la komenco, ek de 1937 ekzistis du, tielnomataj neŭtralaj, Esperantogrupoj en nia urbo. Ili apartenis al du diversaj asocioj en la lando ĝis en 1962, kiam fondiĝis Belga Esperanto Federacio. Post la statutŝanĝo de BEF en 1980 ili apartenis al la sama FL.L.E. En 1983, Charles Poupeye, longjara prezidanto de la Bruĝa Grupo Esperantista, proponis kunfandiĝon. Bedaŭrinde li forpasis la 10-an de junio de la sama jaro. La kunfandiĝo tamen okazis , post kunsido de la du estraroj la 14an de julio 1983.

Paco kaj Justeco festis sian 50 jaran ekzistadon en 1987 la 21an de marto. Dum la oficiala akcepto fare de la urbestraro en la urbodomo paroladis la Prezidanto F.Roose pri la historio de la grupo, Gr. Maertens pri centjara evoluo al pli da lingva justeco kaj paco, kaj E. Symoens pri la Esperanto-komunumo. La urbestro F. Van Acker fermis la kunsidon post honorigo de la teamo kiu dum la kvindek jaroj de la ekzistado gvidis la grupon, nome Fernand Roose, prezidanto kaj Roger Iserentant, sekretario.

Nova duopo transprenis la torĉon: Andre Dumarey, membriĝis en 1946, prezidanto, kaj Johan Van Eenoo, sekretario, kiu siavice prezidantiĝis (ĝis nun). G. Maertens provizore transprenis la sekretariejon, fine de 2004, Heidi Goes akaparis la postenon.

Dum la komenca periodo de la 21-a jarcento la grupa programo konsistis el bunta alternado de komunaj vizitoj al ekspozicoj kaj muzeoj, ene de la urbo kaj en la lando, sukcesintaj kursoj, kaj paroladoj pri Eŭropo, pri landoj en Afriko, pri Brazilo, Nederlando, Rumanio, Kubo, Ruslando, ktp.


La grupo dum sufiĉe longa periodo ne havis la okazon por partopreni en publika ekspozicio, sed la 14-an de majo 2006 ni partoprenis en organizaĵo de la urbo mem," Cultuurkuren" en la antaŭa concertejo. FEL disponigis la ekspozician materialon (kiun la prezidanto devis transporti el Antverpeno kaj reen). Ni disponis pri bona loko tiel ke multaj homoj vizitis nian standon. ĝi tre utilis por la informado pri planita aŭtuna kurso.

Por fini, pozitiva aspekto de la grupa agado konsistas en la daŭra kunlaborado enlanda kaj internacia pere de iuj aktivecoj de la membroj. F.Roose elektiĝis dum kelkaj jaroj kiel estrarano de FEL kaj aktivis kiel prezidanto kaj vicprezidanto de BEF, kaj redaktoro de ties revuo Sonorilo; Roger Iserentant gvidis ĝis la fino de 1977, dum pli ol dudekkvin jaroj "Flandra Esperanto Instituto",(poste "Sonorilo) kiu vendis esperantaĵojn en la tuta lando; Grégoire Maertens sekretariis por Flandra Ligo Esperantista, poste por Flandra Esperanto-Ligo dum pli ol 25 jaroj, teh'nike redaktis la kaŝgazeton de P.& J., estris la Eŭropan Esperanto-centron en Bruselo dum pli ol dek jaroj, komitataniĝis en U.E.A. en 1960 kaj transprenis estraranecon en Institucio Hodler '68 en 1970, eniris la estraron de U.E.A en 1977, kaj prezidis tiun asocion ekde 1980 ĝis 1986 kaj poste elektiĝis kiel vicprezidanto ĝis 1989.

Bart Demeyere funkciis dum longa periodo kiel prezidanto de Flandra Esperantista Junulara Asocio (FLEJA), poste funkciis kiel estrarano de FEL. Sama kelkaj aliaj grupanoj estraraniĝis dum kelka tempo en FEL: Heidi Goes, Roland Rotsaert kaj Johan Van Eenoo. Roland Rotsaert redaktas ankaŭ "Vertikale" por la aktivuloj de FEL, kaj kunlaboras en la fama Esperanto-Biblioteko Van Biervliet en Kortrijk. La nuna sekretariino Heidi Goes fakte restarigis la movadon en Indonezio, post grandskala instruado pere de diversaj kursoj en 2009 kaj 2010 en tiu lando. ŝi ankaŭ stimulas la eldonon de la nova revuo " Esperanto en Indonezio " kies provnumero aperis en julio 2011.

Per tia kapacito Paco kaj Justeco ankoraŭ estas prosperanta grupo, kvankam dum la lastaj jaroj, niaj kursoj ne estis sukcesintaj. Feliĉe la estonto estas certigita pro tri denaskaj esperantistoj, filetoj de Bart Demeyere, Heidi Goes kaj Johan Van Eenoo.

Grégoire Maertens.



Commiceren via tolk

Opmerkelijk is dat Jan Vannieuwenburg, vertegenwoordiger van de haven van Zeebrugge in China, zelf géén Chinees spreekt. „Communiceren doe ik via een tolk. Ik kan wel een taxi bestellen in het Chinees, maar als je de taal niet tot in de puntjes beheerst, moet je niet proberen om bijvoorbeeld met een belangrijk politicus in het Chinees te praten."

(Het Nieuwsblad, 16.4.2011)

Native speakers zijn verrijking voor scholen, maar...

Enkele jaren geleden namen de Vlaamse en Franse Gemeenschap initiatieven om leerkrachten uit te wisselen, zodat de taallessen konden gegeven worden door *native speakers*. In het schooljaar 2008-2009 was het een succes met 38 deelnemende scholen. Dit jaar is er slechts één uitwisseling. Het blijkt organisatorisch en administratief moeilijk te zijn voor de scholen, al vind men het een verrijking. Onderwijsminister Smet zal de uitwisselingen nieuw leven inblazen en enkele reglementaire obstakels wegwerken.

(Brussel deze week, 31.5.2012)


Esperanto

Vertaalwedstrijd


In 1913 organiseerde een commissie met o.m. Tristan Bertrand en Abel Hermant (in 1927 lid van de *Académie française*) een vertaalwedstrijd. Zes personen vertaalden elk een Franse tekst naar het Russisch, Duits, Engels, Italiaans, Spaans en Esperanto. Daarna vertaalden zes anderen de teksten terug naar het Frans. De via Esperanto en Italiaans vertaalde versies bleken bijna exact overeen te stemmen met het origineel. Jefim Zajdman uit Jalta wil volgend jaar, honderd jaar na het eerste experiment, volgens dit model een vertaalwedstrijd organiseren. Het kan ook een onderdeel van een Esperanto-cursus zijn.

(Sennaciulo, 03-04/2012, www.traduko.com.ua)





Maandelijks tijdschrift in de internationale taal Esperanto; lezers in 65 landen; oprichter: Stefan Maul; 33ste jaargang; verschijnt in principe de eerste van elke maand.



Por ekscii pliajn informojn pri jenaj eventoj, eblas ankaŭ telefoni al la Esperantocentro en Antverpeno, 03 234 34 00, aŭ viziti/skribi al Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

TEJO-volontulo serĉata!

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) serĉas volontulon por labori en TEJO-oficejo (Roterdamo) dum ĉirkaŭ unu jaro ekde aŭgusto/septembro 2012.

Limdato por kandidatiĝi : 30a de majo 2012 Pli da informoj pri la kondiĉoj kaj la kriterioj ĉe la retejo de TEJO : http://tejo.org/eo/volontulu

Aŭdebla libro: fabelo de Andersen, farita de Portal Kunlaboro

Ni invitas vin koni la MP3 sondosieron de Fabelo de Andersen titolita "Plej Bela Rozo de la Mondo" kun la voĉoj de Flávio Fonseca, Cristina Pancieri kaj Clara Pancieri.

Jen la ligilo por senpaga elŝuto:

http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/plej-bela-rozo-de-la-mondo/

Oni povas libere kopii kaj disdoni la sondosieron!

2-a esperanto-konferenco en Alikanto (aŭtuno 2012)

de la 26-a ĝis la 31-a de oktobro 2012 okazos la 2-a esperanto-konferenco en alikanto, hispanio. somero aŭtune en la mondfama mezmara urbo kun subtropika klimato.

esperanto, kulturo, librobazaro, feriado.

verde (esperante) vivi,
querstr. 11, de- quierschied.
tel: +49 171 6972721,
ret: drfjd#web.de

Kalendaro de Greziljono

Loga programo en la franca Esperanto-kastelo Greziljon!

julio-21/28: Art-amatora semajno kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj. Informoj interrete: gresillon.org/s1

julio-28/aŭgusto-04: Alternativa semajno kun verdpolitika seminario kaj E-kursoj; por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj. Informoj interrete:gresillon.org/s2

aŭgusto-04/11: Turisma kultura semajno, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze. Informoj interrete: gresillon.org/s3

aŭgusto-11/20: Pupteatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj. Informoj interrete:gresillon.org/s4

Kontaktoj: kastelo#gresillon.org, +33-241 89 10 34, www.gresillon.org, Adreso: Gresillon, 49150 SAINT MARTIN D'ARCE, France

Jara agendo: gresillon.org/agendo

SOMERE 2012 denove en Jünkerath

Venu somerumi kun ni!

En 2012 la internacia somera renkontiĝo de EsperantoLand okazos denove en Jünkerath, meze inter Kolonjo kaj Treviro (Trier); ni planas ĉi-foje unu semajnon de la 13-a ĝis la 21-a de julio. Kunvenos proksimume 20 ĝis 30 gastoj, ĉefe el Nederlando, Belgio, Luksemburgio kaj Francio.

Interparoloj kaj ekskursoj, kelkaj prelegoj kaj lingvokursoj

La programo estos varia, kiel kutime - la celo estas senstreĉaj ferioj. Estos Esperanto-lingvokursoj por komencantoj, progresantoj kaj konversacio, prelegoj kaj diversaj kursoj laŭ la oferto de la partoprenantoj. Krome ni faros promenojn kaj ekskursojn.

Ludsalono por infanoj kaj plenkreskuloj


Aparte alloga certe estos denove la granda ludsalono de la domo, kie pluraj dekoj da ludoj pretas por amuzi nin. Testu vian lertecon, vian kapablon ĵeti pilkon, moviĝi sur testudeto aŭ celtrafe ŝovi platojn!

Detaloj kaj la aliĝilo nun troviĝas sur nia retpaĝo pri SOMERE 2012. Jen kelkaj el la partoprenintoj en la pasinta SOMERE 2011.

Ĝuu la someron ĉe EsperantoLand!
www.esperantoland.de

97a UK en Hanojo, (la 28-an de julio - la 4-an de aŭgusto 2012

Eblas aliĝi al la 97a UK en 2012 en Hanojo (Vjetnamo) per FEL, kontaktu nin rete (info#fel.esperanto.be) aŭ telefone (03 234 34 00)



Tenzij anders vermeld zijn alle vergaderingen gratis en voor iedereen toegankelijk. Let wel dat de meeste activiteiten in het Esperanto plaats-vinden. Uiteraard zijn we steeds bereid geïnteresseerde bezoekers in het Nederlands te woord te staan.

ANTWERPEN – groep "Esperanto Antwerpen"

http://esperanto-antwerpen.weebly.com/

Alle programma's hebben plaats in het Esperantohuis, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, in het clublokaal op de eerste verdieping. De clubavond begint om 20.00 uur. Iedereen is welkom.

Elke vrijdagavond is er een bijeenkomst. Het programma zal tijdig verschijnen op volgende webstek: http://esperanto-antwerpen.weebly.com/

De groep Verda Stelo zal, als een van de enige clubs, ook in de zomervakantie bijeenkomsten hebben. In het verleden hebben we in die periode al heel wat buitenlandse gasten ontvangen. Om die reden is er geen vast programma. Maar er zal elke week een programma zijn dat via de electronische weg zal aangekondigd worden. Wie nog niet op de maillijst staat, kan meer informatie verkrijgen in het Esperanto-centrum (03/234 34 00) of bij de programmaverantwoordelijke (ivo.durwael#telenet.be – 0494/068271).

BRUGGE – Paco kaj Justeco

Hou onze webstek www.esperanto-brugge.weebly.com in het oog voor de komende activiteiten of vraag meer informatie via: heidi.goes#gmail.com.

BRUSSEL – Esperantista Brusela Grupo

http://users.belgacom.net/EBG

Opgelet: nieuwe vergaderplaats: gebouw Van Maerlant, op de hoek van de gelijknamige straat en de Belliard-straat, tegenover het Leopoldpark, dicht bij metrostation Maalbeek.

Elke woensdag van 18.30u tot 20u. Aangezien dit gebouw tot de Europese Instellingen behoort, is er een vrij strenge controle. Bezoekers gelieven zich op voorhand aan te melden.

Info: Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, 1640 St-Genesius-Rode, fransuaz#esperantobruselo.org, tel.: 02 358 27 28.

GENT – La Progreso

http://www.esperanto.be/gent

Iedere 4de vrijdag van de maand clubvergadering in ons lokaal "La Progreso" Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge; aanvang: 20.00 uur. Inlichtingen bij Katja Lődör, tel. 09 230 16 77 of 09 221 10 02.

KALMTHOUT – LA ERIKEJO

http://users.telenet.be/La.Erikejo/Index.htm

In juli en augustus heeft La Erikejo geen samenkomsten.

KORTRIJK KONINKLIJKE ESPERANTOGROEP LA KONKORDO

www.esperanto-kortrijk.info

Maandelijkse bijeenkomst in Erfgoedhuis zaal Lessius 1ste verd. O.L.Vrouwstraat 45, Kortrijk tel. 056/27 74 24. Elke vierde dinsdag van elke maand van 19u30 tot 21u30 niet tijdens juli en augustus. Indien de vierde dinsdag een feestdag is dan op de derde dinsdag.

Contact via mail piet.glorieux#gmail.com en esperantokortrijk#hotmail.com.

ESPERANTO-FONDS CESAR VANBIERVLIET:

Normaal zijn op elke eerste en derde donderdag van de maand vrijwilligers aanwezig in het Esperanto-Fonds Cesar Vanbiervliet te Kortrijk.

LEUVEN - Esperanto 3000

http://www.esperanto.be/esperanto3000

Esperanto 3000 heeft in de zomervakantie geen vast programma.

OOSTENDE – LA KONKO

Meer info: Marc Cuffez, voorzitter via 0486 362365 of marc.cuffez#telenet.be; Flory Witdoeckt, ondervoorzitter via 059 702914 of flory2#witdoeckt.be

Lokaal: Albertschool, Ooststraat 29 te Oostende (tenzij anders vermeld)


In juli en augustus heeft La Konko geen samenkomsten.

Ma 3 sep : conversatienamiddag 14u30-16u30

Vr 7 sep : info-avond voor nieuwe cursisten 18u30 - 20u00

PEER

Elke laatste donderdag van de maand van 20 u. tot 22 u. in Cultuurcentrum "'t Poorthuis", Zuidervest 2, 3990 Peer van september 2011 t/m juni 2012. Alle Esperanto-sprekers zijn van harte welkom !



Contactadressen in Vlaanderen

ANTWERPEN *Esperanto-Antwerpen*, p/a Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, tel.: 03 234 34 00, E-post: esperanto-antwerpen#esperanto.be
BRUGGE *Paco kaj justeco*, Heidi Goes, Assebroeklaan 2, 8310 Brugge, tel. (0)50 67 51 78 heidi.goes#gmail.com
BRUSSEL Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, 1640 St-Genesius-Rode, fransuaz#esperantobruselo.org, +32 2 358 27 28
Laurent Loisse, Tir-aux-Pigeons 95 1150 Bruxelles. tel.: 02 770 11 71, sekretario#esperantobruselo.org
GENT *La Progreso* Katja Lödör, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge, tel.: 09 230 16 77, gent#esperanto.be
KALMTHOUT *La Erikejo*, Mireille Smet-Storms, Dogulaslaan 14, 2950 Kapellen, tel.: 03 666 83 19, mireillestorms#hotmail.com
KORTRIJK *La Konkordo* P. Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8 bus 0201, 8610 Kortemark, tel.: 051 62 39 28, piet.glorieux#gmail.com,
Jean-Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk, tel.: 056 20 07 96, esperantokortrijk#hotmail.com
LEUVEN *Esperanto 3000* Roger Goris, Rue Ménadastraat 44, 1320 Hamme-Mille, tel.: 010 86 01 12, goris.r#skynet.be.
LIMBURG *Limburgse Esperantovereniging* H. Schutters, Panhovenstraat 10, 3930 Peer, tel.: 011 63 55 92, henri.schutters#skynet.be.
LONDERZEEL Frederik Vanden Brande, Hof ter Winkelen, Holle Eikstraat 25, 1840 Londerzeel. Tel.: 052 30 01 66, fax: 052 30 53 65. comite.jean.pain#skynet.be.
OOSTENDE *La Konko* Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65 (gsm), marc.cuffez#telenet.be.
ROESELARE / TIELT zie KORTRIJK
TIENEN *La Hirundo* <http://www.lahirundo.be> Info: Bert Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen,Tel en fax: 016 / 81 52 46, post#lahirundo.be
TURNHOUT Maria Dom, Tuinbouwstraat 14, 2300 Turnhout, tel.: 014 41 72 92, de.groot-dom#telenet.be.

Contactadressen in Nederland

http://www.esperanto-nederland.nl/ned/regionale-groepen.php
ALKMAAR Afdeling Alkmaar. Bert Klijn, Klipper 119, 1721 GW Broek op Langedijk, tel.: 0226-314183, esperanto.alkmaar#gmail.com
ALMELO G.C.A.M. Dercks, Molenstraat 20, 7607 AL Almelo. Tel. 0546 819403, gcamdercks#home.nl
AMSTERDAM Ans Bakker-ten Hagen Kastelenstraat 231-2, NL-1082 EG Amsterdam, tel.:+31(0)206 421 853, ten_hagen#concetps.nl
APELDOORN: Mevr. A. Schouten, Dintel 20, 733 MC Apeldoorn. Tel. 055 5332923, sampan#telfort.nl
BEVERWIJK *Stelrondo* R. Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, tel.: (0251)231079, r.moerbeek#kpnmail.nl
DEN HAAG *Internationaal Esperanto-Instituut (IEI)* Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, tel.: (070) 355 66 77.
DEN HELDER *Contact:* Vinus Lathouwers Kruiszwin 1205 NL-1188 LE Den Helder, tel.: +31(0)223 643 781, lj.lathouwers#quicknet.nl
DEVENTER zie ALMELO.
EINDHOVEN R. Bossong, Floraplein 23, NL-5644 JS Eindhoven, tel.: (040) 211 41 62, ru.bossong#planet.nl
ENSCHEDE Corrie Kwantes, Marnixstraat 57, 2023 RB Haarlem, Tel 023-5276561.
GOUDA Alfonso Pijnacker Postbus 778 NL-2800 AT Gouda, tel.:+31(0)651 376 257, a.pijnacker#xs4all.nl
GRONINGEN *Esperantocentrum*, T.W.S. Mansholtstraat 25, NL-9728 MC Groningen, tel.: (050) 527 45 72.
HAARLEM-HEEMSTEDE *Komprenado faras pacon*
Corrie Kwantes, Marnixstraat 57, 2023 RB Haarlem, tel.: 023-52 76 561.
HEEMSKERK Joke Hoobroeckx Marquettelaan 33 NL-1964 JR Heemskerk, tel.:+31 (0)251 232 155, hbxd#freeler.nl
HELMOND Toine Gremmen, Nassaustraat 3, 5707 HL Helmond, tel.: (0492) 54 44 72, info#twangremmen.nl
LEIDSCHENDAM-VOORBURG: M.H. Erasmus-van Zadelhoff, Laan van Oostenburg 40, NL-2271 AP Voorburg, tel.: (070) 38635 29, marjet.erasmus#zonnet.nl
MIDDEN ZEELAND S.P. Smits, Deken Tomaslaan 32 NL-4453 AL 's-Heerenhoek, tel.: +31(0)113 351 456, spsmits#hotmail.com
NIJMEGEN Klubo "Zamenhof" Jan Bemelmans Turkcoisstraat 43 NL-6534 WD Nijmegen, tel.: +31(0)243 882 926
OOST-VELUWE Anneke Schouten-Buys Dintel 20 NL-7333 MC Apeldoorn, sampan#tiscali.nl
ROTTERDAM *Merkurio* P. Schuil, Park Vossendijk 331, 3192 XG Hoogvliet, tel.: (010) 416 14 49.
TANEF/*La Migranto* Aad Demmendaal-o/d Brouw, Boekenrode 11, NL-3085 JA Rotterdam, tel.: (010)48 15 388
UTRECHT E.O. Ed Borsboom Noordweg 34 NL-3704 GN Zeist, ed.borsboom#versatel.nl
VOORBURG: zie Esperantogroep LEIDSCHENDAM-VOORBURG
ZEEUWS-VLAANDEREN: Det Koning, van Speykstraat 19, 4535 BN Terneuzen, tel.: 0115 694 670, det#digitalplaygrounds.com


Andere nuttige adressen

Vlaamse Esperantobond / Flandra EsperantoLigo Frankrijklei, 140, B-2000 Antwerpen. Tel.: 03 234 34 00, Fax.: 03 233 54 33. Epost: info#fel.esperanto.be. Internet: www.esperanto.be
Vlaamse Esperanto Jongeren Vereniging / Flandra Esperanto Junulara Asocio p/a Frankrijklei 140, B2000 Antwerpen. Tel.: 03 234 34 00 Epost: fleja#esperanto.be.
ILEI-Belgio: Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65, marc.cuffez#telenet.be
Esperanto Scoutsvereniging/Skolta EsperantoLigo (SEL) Stein Hautekees, Rue des Rèches 20, B-5530 Yvoir, post#sel-belgio.be Zie ook: www.sel-belgio.be
Association pour l'Esperanto, p/a Marcel Delforge, rue des Glacières 16, B6001 Charleroi (Marcinelle). Tel.: + fax: 071 43 14 13. Epost: mardelforge#brutele.be.
Belga Esperanto Fervojista Asocio (Spoorwegesperantisten), Lucien De Sutter, Frère Orbanstraat 210, 8400 Oostende. Tel:059 50 18 25.
Esperanto Nederland, secretaris, p/a Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, T: 050-5718842, E: sekretario#esperanto-nederland.nl
Hoofdkantoor van de Esperanto WereldVereniging/Centra Oficejo de UEA Nieuwe Binnenweg 176, NL3015 BJ Rotterdam, tel.: 00 31 10 436 10 44. Epost: uea#inter.nl.net.

Bestuursleden van FEL

Voorzitter:	Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende, tel 0486 362365, marc.cuffez#telenet.be
Ondervoorz.:	Flory Witdoeckt, Wapenplein 17/8, 8400 Oostende, tel. 059 702914, flory2#witdoeckt.be
Penningmeester:	Kevin De Laet, Muizenstraat 5/3, 2060 Antwerpen, kevin.de.laet#telenet.be
Secretaris:	Griet Symoens, Koningsstraat 9/5, 8400 Oostende, griet.symoens#esperanto.be, 28 sep 1944 Kalmthout
Bestuurslid:	Helena Van der Steen, Turnhoutsebaan 458/12, 2140 Borgerhout, h.vdsteen#scarlet.be
Bestuurslid:	Roland Rotsaert, Marie Popelinplantsoen 3/402, 8000 Brugge, roland.rotsaert#gmail.com
Bestuurslid:	Bart Demeyere, Albert Dyserynckstraat 28, 8200 Brugge, bart.demeyere#esperanto.be
Bestuurslid:	Walter van den Kieboom, Tulpenlaan 16, 8450 Bredene, tel 059 702914, flory#witdoeckt.be

ISSN-0772-540X afgiftekantoor Antwerpen X
Tweemaandelijks tijdschrift







John Francis

◈ ◈ ◈

Kronprincedzino

◈ ◈ ◈

Vi deziras senti vin kavaliro? Vi bedaŭras ke vi ne vivis en kastelo kun imponaj remparoj kaj levebla ponto antaŭ la kirasita pordego? – Jen la libro por vi! Vi ŝatas legi bonstilan, simplan knabecan rakonton? Vi deziras ree senti vin transiri de knabeco al junuleco?
– Jen la libro por vi!
Nova, triĉapitra, rakonto pri intrigoj, miskomprenoj kaj sekretaj bataloj en mezepoka etoso atendas vian legadon. Ne atendu filozofion! Ne atendu sciencon! Ne atendu pasiajn amaferojn! Estas nur simpla, amuza, distra rakonto sed en modela natura lingvo.



John Francis (1924), skota licea profesoro pri angla lingvo, estas precipe konata kiel unu el "Kvaropo". En tiu grandioza verko el nia literaturo aperis lia granda poemo "La Kosmo". Poste aperis noveloj, romanoj, poemaroj. Plej fama estas lia "La granda kaldrono", eble la plej ampleksa romano en Esperanto ĝis nun, pri la travivaĵoj de kvin skotoj dum la unua kaj dua mondmilitoj. Liaj "Tri rakontoj pri la Miljara Paco" aperis en nia Serio Stafeto, kaj estis treege sukcesaj.

Eldonjaro: 2012
Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 197 paĝoj, ISBN: 978 90 77066 47 8;
prezo ĉe FEL: 16,00 EUR + afranko (1,83 por Belgio)

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko#fel.esperanto.be